

Gazetara Informo

Somera Festo sur la Esperanto-placo

je la 9-a de Septembro 2015 de 15:00 ĝis 18:00 h

A-Z Hilfen Berlin gGmbH kaj Esperanto-Ligo Berlin r.a. invitas vin ankaŭ en la jaro 2015 al la Somera Festo sur la Esperanto-placo en Berlin-Neukölln.

Je la 9-a de Septembro de 15:00 ĝis 18:00 h vin atendos kolora nekomerca programo kun kantado, dancado kaj teatro, informejoj kaj ekspozicio, ludaktivecoj por infanoj, ĝardenumado kaj multaj aliaj aferoj.

Asocioj, institucioj kaj loĝantoj de la kvartalo ĉirkaŭ la Esperanto-placo komune aranĝas la feston por

- konatigi siajn intencojn kaj ofertojn kaj komune paroli pri tiuj,
- plivalorigi la Esperanto-placon kiel lokon de la renkontiĝoj de kulturoj,
- atentigi pri la situacio kaj la ŝancoj en la kvartalo ĉirkaŭ la Esperanto-placo

Malfermos la feston je la 15-a horo, kiel jam dum la pasintaj jaroj, la munkena artistino Adler A.F. kiel Rub-reĝino, ĉifoje per ŝia provoka prezentaĵo >Novkolonjo restas malpura!<.

La signalon por la komenco de la kampanjo „Parolu klartekston sub la Zamenhof-kverko“ donos la aranĝantoj per siaj pensoj pri la placo kaj la kvartalo.

Sekvos prezentaĵoj de dancoj kaj kantoj de infanoj el la infanvartejo St. Richard kaj el la lernejo „Löwenzahn“ (leontodo).

La lingvon Esperanto oni renkontos dum la muzika programo, dum iPad-ludoj kaj dum aliaj okazoj dum la festo.

Roma Trial kaj la Interkultura Teatrocentro ĉe la Esperanto-placo speciale akcentos la feston per perkutinstrumenta metiejo, per la ekspozicio „Duavide“ kaj per teatra prezentaĵo de junuloj .

Kunlaborantoj de A-Z Hilfen Berlin klarigos siajn helpofertojn por enmizeriĝintaj junaj plenkreskuloj. Ili ankaŭ ofertos metiajn kaj ŝminkajn agadojn por infanoj.

La Urbaj Agentoj organizos ekde la 16-a horo verdigan agadon sur la placo per la programo „Socia urbo“.

La muziktrupo „Querbeet“ muzike akompanos kelkajn festerojn.

La katolika preĝejo St. Richard invitos je 16:30 h al vizito.

La artisto Christoph agi Böhm komencis la realigon de sia projekto „Birdo/Mondo/Urbo“ sur la Esperanto-placo. Rigardu, kiugrade jam progresis tiu ĉi projekto por la arta plivalorigo de la Esperanto-placo!

La ludomobilo de la infana pavilono ĉe la Drory-placo invitos la plej junajn festparto-prenantojn al ludagado sur la ludejo ĉe la Esperanto-placo. La junulara klubo „Die Scheune“ (la garbejo) de AWO invitas infanojn kaj gejunulojn al futbalmaĉo sur la najbara ludejo.

Venu je la 9-a de Septembro al tiu ĉi placo de Neukölln (Novkolonjo), la verda oazo proksime de la S-trajna stacidomo Sonnenallee, la pordego al la Bohema kvartalo kaj al la malnova Rixdorf kaj subtenu nian intencon, pliatrakciigi tiun ĉi renkontejon de diversaj kulturoj kaj lingvoj.

Se vi deziras pli da informoj, bv. turni vin al:

Germana Esperanto-Asocio

Tel.: 030 / 5106 2935 / fakso: 030 / 4193 5413 / infozentrum@esperanto.de,
www.esperanto.de/de/esperantoladen

Kun afablaj salutoj

Marco Schulze, administranta direktoro de A-Z Hilfen Berlin gGmbH

Ronald Schindler, prezidanto de Esperanto-Ligo Berlin r.a.



Sur la Esperantoplaco dum la Somera Festo en septembro 2014.

Por aldoni la foton al via informo, petu ĝin ĉe Germana Esperanto-Asocio,
infozentrum@esperanto.de!